

LA DOM' DE L'NASKIĜANTA SUN'

Anonimo
Esperantigo: Emanuele Rovere

Ekzistas dom' en Novorlean'
nomata "l'Naskiĝanta Sun'".

Estis tie de junuloj mil la ruin',
eĉ por mi, sen honto, sen pun'.

Tajloro estis panjo,
ŝi kudris por mi novan ĝinzon
kaj estis kartludisto paĉjo,
tie, en Novorleano.

Jam nur bezonas la kartludist'
kofron kun ludkartoj, vestaĵoj
kaj fariĝas feliĉa por li la ekzist'
nur se abundas drinkaĵoj.

Patrinoj, do, admonu
la filojn viajn nun,
ke l'vivon ili ne bruligu
en la Dom' de l'Naskiĝanta Sun'.

Mi sidas jam en trajno,
min vokas Novorleano,
al la esper' pri luda gajno
min ligas la kateno.

Jes, estas dom' en Novorlean'
nomata "l'Naskiĝanta Sun'".
Estis tie de junuloj mil la ruin',
eĉ por mi, sen honto sen pun'.
Eĉ por mi, sen honto, sen puno.